



ORIENTA STELO

Aŭgusto 2016



Orienta Esperantista Federacio
Originale fondita en aprilo 1932

Eastern Esperanto Federation
Originally founded in April 1932

Komitato - Kontaktdetaloj

Roy Simmons
Barrie Murphy
Mark Drake
Roy Threadgold

Sekretario 01473461346
Kasisto 01702472193
Komitatano 02085188094
Bultenisto 01371850481

rokeby@globalnet.co.uk
celiaandbarrie@tiscali.co.uk
marko.drejko@gmail.com
roy@boydellsdairy.co.uk

Tiuj kiuj ricevas OS rete, ricevas ĝin pli frue kun koloraj bildoj, kaj samtempe la Federacio ŝparas la poŝtkoston. Ĉiuj gajnas! Nur bezoniĝas informi al Roy T. pri via retadreso.

Fervoja vizito East Anglian Railway Museum, Chappel Dimanĉon la 4an de Septembro

Du ebloj:

1) De Marks Tey Stacidomo

Atingebla fervoje aŭ aŭte (A12 ĝis J25),
Aŭtoparkejo ĉe Marks Tey £2.70

La Sudbury trajno ekruliĝas kvaronon post ĉiu horo, atingas
Chappel & White Colne stacidomo ses minutojn poste, kaj
kostas £3.80

La ĉefa ĉarmo de tiu vojaĝmetodo estas ke vi spertos veturon
trans la mirinda viadukto en Chappel, 24 metrojn super la
valo. Ĝi estas la dua plej granda brikkonstruaĵo en Anglio kaj
longas 364 metrojn..

Tiuj kiuj alvenas ĉe la muzeo fervoje rajtas havi 10% rabaton de la enirkosto

Mi sugestas ke tiuj kiuj deziras tiel vojaĝi, trafu la 1115 trajnon, kaj, se pli ol tri, petu la biletojn
kune per "Group Save" kiu provizas trionan rabaton.

Mirinde, Network Rail (ĝis nun) ne publikigas avertojn pri riparlaboron kaj ĉesigo de trajnservoj.



2) Alie oni povas veturigi sin **rekte al Chappel**. Tiookaze vi povos parki senpage.

La muzea enirkosto estas £6 (olduloj £5 !)

Ni renkontiĝu ĉe la muzea enirejo ĉ. 1125

Summer outing to
East Anglian Railway Museum, Chappel,
Sunday 4th September
Meet up at the museum entrance at 1125.
If you wish to arrive by train and experience crossing the renowned
Chappel Viaduct, the ideal train leaves Marks Tey (for Sudbury) at 1115

La 12a de marto 2016 en Braintree

Denove Braintree estis la elektita loko por nia marta jarkunveno, kaj denove Network Rail decidis nuligi la fervojservicon. Ŝajnas al mi ke ties estroj vere estas malsamideanoj. Tamen, ok anoj renkontiĝis por pasigi la tagon kune.

Kiel kutime, nia kunvenejo estis Church House, sed, pro la plialtigita luprezco, ni kunvenis en alia, plej malgranda, supra ĉambro. Tio provizis novan problemeton: mi (Roy T.) devis foriri du horojn dum la tago, kaj reveninte, kaj trovinte la pordon ŝlosita, mi ne povis atentigi la ĉeestantaron pri mia alveno. Trovinte longajn kanojn, mi finfine sukcesis vekti iun per fenestrofrapo! Matene ni dividis la kuirejon kun "Kafmateno" okazante malsupren, sed posttagmeze Roy S. regis la tutan ĉambron por prepari lunĉon. Dankon, Roy.

La lingva disputo celis ĉefe la uzadon de "tiel" kaj/aŭ "tiele". Mi ne certas ĉu ni sukcesis expliki la diferencon, tial (tiale?) mi ne komentos plu(e).

La promeno celis la publikajn ĝardenojn kaj akriĝis la apetiton antaŭ la lunĉpaŭzo. Kelkaj anoj faris prelegeton pri "Mia Esperanta Vivo".

La tago finiĝis per la ludo "Baŭmo".

SCIURO KAJ PAPAGO *V. Devjatin*

Sciuro malgranda kuradis en rado
Kaj homojn amuzis per sia kurado.
Kaj jen al papago ĝi diris fiere:
"Mi vin, mizerulo, bedaŭras sincere:
Kun kora doloro eterne mi vidas,
Ke tute senmove sur ringo vi sidas!...
Rigardu: jen ĉiam mi kuras pli alte
Kaj tial pri l'vivo kontentas senhalte...."
Papago rigardis sciuron kun moko
Kaj diris: "kurado rapida kaj lerta,
Sed bone kurante, sur unu nur loko
Vi restas, mizera besteto nesperta."



Noto de via bultenisto:

Mi estas decidinta ke, post 20 eldonaĵoj, estas tempo por ŝanĝo de bultenisto, tial mi intencas produkti nur maksimume du ekzemplerojn pli, antaŭ ol eksiĝi.

Eble vi, kara leganto, ŝatus esti redaktoro? Se interesata, bv. kontakti min. Roy T.